



Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto  
American Association of Esperanto Teachers

(Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)

(Branch of the International League of Esperantist Teachers)

Numero 178

ISSN: 0002-7499

septembro 2008

## Enhavo

### AATE Matters

AAIE havas novan retejon.....	1
Ni serĉas Edukan Sekretarion.....	1
Bonvenon al la jenaj novaj membroj.....	2
Dato de nia jarkunsido jam aranĝita.....	2
Ĉu AAIE ŝanĝu sian nomon?.....	2
Instru-Sugestoj.....	2
LEI Matters.....	3
From and About Our Members.....	4
Recommended Reading.....	5
Esperanto-Instruado Alilande.....	5
Want to Correspond.....	5
Kalendaro.....	6
Pri Esperanto-Ekzamenoj.....	6
Children and Esperanto.....	7
Esperanto-Instruado en Usono kaj Kanado.....	7
Anonco.....	8
Course Report Form.....	9
Membership Form.....	10

### Redaktoro

Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr.,  
Santa Barbara CA 93111-2521 USA  
<dorothyjeanh@gmail.com>

### Vic-Prezidando / Bultena Formatisto

D Gary Grady <dgarygrady@verizon.net>

### Prezidanto

Ron Glossop <rglossop@mindspring.com>

### Eduka Sekretario

(nun mankas)

### Koresponda Sekretario

Sally Lawton <slaw-o@crocker.com>

### Kasisto

Mary Napolitan <mjpn@comcast.net>

<http://aaie.us>

## AATE Matters

### AAIE havas novan retejon

Nun funkcias nova retpaĝaro por AAIE ĉe <http://aaie.us>. La nuna enhavo inkluzivas event-kalendaron, aliĝilon, kaj la statuton de la Asocio, ĉio en Esperanto kaj la angla. Ni planas aldoni pli da informo dum la venontaj semajnoj kaj monatoj.

Se vi havas korektojn, sugestojn, ktp, aŭ des pli bone se vi volus rekte helpi en la laboro, bv skribi al Gary Grady ĉe <DGaryGrady@verizon.net>. Pro nia uzo de la facile lernebla enhavmastrumada sistemo "Dokuwiki", verki kaj revizii paĝojn estas facile kaj ne postulas scipovaon pri HTML.

### Ni serĉas novan Edukan Sekretarion!

Beth Magallon (kiu nun estas s-ino Dorcas!) jam fidele servis kiel nia Eduka Sekretario ek de julio 2006. Tamen, pro la multaj ŝanĝoj en sia vivo post sia edziniĝo en junio ĉijare, ŝi bedaŭras ke ŝi ne plu povos daŭri tiun laboron.

En la nomo de ĉiuj niaj membroj, via redaktoro volas kapti ĉi tiun okazon tutkore danki ŝin pro ŝia konsciencia laboro dum la pasintaj du jaroj, kaj elkore deziri al ŝi kaj ŝia nova edzo ĉion bonan!

Sed nun necesas trovi novan Edukan Sekretarion. Jen urĝa mesaĝo de nia Prezidanto, kiu ĉijare mem servis kiel la "Kandidatiga Komitato":

"Mi ankoraŭ sercas voluntulon esti nia Eduka Sekretario dum la venontaj du jaroj. La ĉefa respondeco estas esti la persono kiu ricevas la raportojn pri la Esperanto-klasoj kiujn oni instruas, kaj poste informi la reston de nia membroj pri tio unufojon jare.

"Bedaŭrinde ne estas multaj klasoj, sed...la rezulto estas ke la tasko de la Eduka Sekretaro ne estas granda. Se vi ne povus trovi lokon instrui Esperanto-klason (mi bone komprenas ke tio ne estas facila...) almenaŭ vi povus helpi nian organizon kiel nia Eduka Sekretaro.

"Bonvolu kontakti min kaj informi min se VI faros tion."

Ron Glossop, Prezidanto  
<rglossop@mindspring.com>  
Telefono: (314) 869-2303

## Bonvenon al la jenaj novaj membroj!

- Miguel Angel Gonzalez Alfonso, kiu loĝas en Havana City, Kubo, estas profesia instruisto, kaj instruas Esperanton kadre de la Kuba Esperanto-Asocio!
- Richard D. ("Rick") Miller, el Muskego, Wisconsin, kiu estas profesia komputil-inĝeniero. Li foje instruis pri komputiloj ĉe la universitata filio en sia urbo (University of Wisconsin -- Waukesha); li hejm-instruis siajn gefilojn; kaj li ĵus iĝis dumviva membro!

## Dato de nia jarkunsido jam aranĝita!

Kiel kutime, la AAIE-jarkunsido okazos kadre de la Usona landa kongreso, kiu ĉijare estos en St. Louis, MO, de la 22-a ĝis la 25-a de majo. Kaj la prezidanto de AAIE, kiu loĝas apude, jam fiksas la daton (kaj eĉ horon!) de la AAIE-jarkunsido: **Dimanĉon, la 24-an de majo, je tagmezo!**

## Ĉu AAIE ŝanĝu sian nomon?

Tiurilate nia prezidanto skribis jene:

Kiel vi scias, antaŭ du jaroj la "Esperanto-Ligo por Norda Ameriko" (ELNA) ŝanĝis sian nomon al "Esperanto-USA" (E-USA). Nun kelkaj personoj opinias ke la "Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto" (AAIE) devus ŝanĝi sian nomon. Sed la situacio ne estas precize la sama. Nun ne ekzistas aparta organizo por instruistoj de Esperanto en Kanado. Eble tia organizo ekekestos en la estonteco, sed

tio probable ne okazos dum almenaŭ la venontaj 2-3 jaroj.

Se vi rigardos la malantaŭan kovrilon de Internacia Pedagogia Revuo, vi vidos ke sub "Sekcioj" oni trovas "Usono kaj Kanado" kun la indiko ke nia reprezentanto ["seki-estro"] estas Doroteo Holland. Efektive la sola alia aktiva ILEI-Sekcio por instruistoj de Esperanto en Ameriko estas en Brazilo, sed reprezentanto por tiu Sekcio mankas. Vi povas rimarki tie ke nun estas Reprezentanto el Meksiko, sed ĝis nun Meksiko ne estas oficiala Sekcio. Ekzistis ILEI-Sekcio en Venezuelo, sed reprezentanto de tiu Sekcio nun mankas.

Do, la demandoj antaŭ ni estas:

- (1) Ĉu ni (AAIE) ŝanĝu la nomon de nia organizo? kaj
- (2) Se jes, kio devus esti la nova nomo? (Ŝajne eĉ "Norda Ameriko" ne taŭgas ĉar Meksiko nun havas sian propran reprezentanton.)
- (3) Kio estas via reago al la nomo "Esperanto-Instruistoj en Usono kaj Kanado" (EI-UK)?
- (4) Kio estas via reago al la nomo "Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj en Usono kaj Kanado" (ILEI-UK)?

Bonvolu sendi viajn ideojn kaj sugestojn antaŭ la fino de la jaro al Ron Glossop <rglossop@mindspring.com> aŭ Doroteo Holland <dorothyjeanh@gmail.com>.

Dankon pro via helpo.

## Instru-Sugestoj

### Self-Instruction

The following suggestions are taken from AAIE member Enrique Ellemberg's web-page "[www.esperantofre.com/eco/len/htm](http://www.esperantofre.com/eco/len/htm)" under the heading "The best way to learn Esperanto..."

"It is better to study 15 minutes every day than to study the whole day and then forget it for more than a week. Otherwise you will need more time to review what you had already studied, instead of going ahead..."

"It is very important to listen to Esperanto. Thus, the ear gets used to the sound of Esperanto and the brain gets used to the structure of Esperanto..."

### "False Friends" Continued

Here are more examples of Esperanto roots and English words which look similar but do not mean the same. Use them as a quiz, a contest, homework, or a guide for instruction--whatever fits your teaching style and your students' needs. (The English is in italics).

*Karuselo*: merry-go-round. Carousel: drinkado, drinkorgio

*Kasko*: helmet. Cask: barrel

*Kojno*: wedge. Coin: monero

*Komforta*: comfortable. To comfort: konsoli

*Kondiĉo*: condition, stipulation. Condition (state): stato

*Konkreta*: opposite of "abstract". Concrete: betono

*Konsekvenco*: consistent, in logical sequence. Consequence:

rezulto, sekvo

*Kontroli*: to check, verify, supervise, keep check on, audit.

Control: regi, direkti.

*Konvena*: suitable, proper, fitting, seemingly, appropriate, becoming. Convenient: oportuna

*Krajono*: pencil. Crayon: pastelo

*Krano*: tap, spigot. Crane: gruo (bird), argano (lifting machine)

*Kriketo* (game of cricket). Cricket (insect): grilo

*Krispa*: crinkled, frilled, wavy. Crisp: facilrompa

(More examples will appear in the December "Bulletin")

### Besto-Krioj+

Materialo bezonata: listo de besto-krioj++, papero kaj skribilo

1) Disdonu liston de besto-krioj++ al la lernantoj.

2) Proponu, ke ili verku frazojn esplorante la elvokivon de besto-krioj.

Donu kelkajn ekzemplojn por ke ili komprenu la proponon:

"La bebo kvake ploris". "La avinjo pepe ridetis". "Mi apenaŭ komprenas kion li diras: li gruntas!"

3) Se inter la kursanoj troviĝas iu desegnemulo, proponu, ke li ŝi ilustru la frazojn...

### ++ Listo de Besto-Krioj

Ansero gakas, anaso kvakas, birdo kvikas, bovo muĝas, ĉevalo henas, hundo bojas/jelpas, kapro mekas, kato miaŭas/ronronas, kokino klukas, koko kokerikas, kokido pepas, kolombo kveras/rukulas, korvo grakas, kukolo kukuas, leono roras/blekas, lupo huras/hululas, muso cincas, muŝo zumas, najtingalo kantas, pasero pepas, porko gruntas, rano kvakas, ŝafo beas, serpento siblas, strigo ululas.

### "Subĉielaj Lecionoj" por Enuigitaj Lernantoj+

Jen unu ekzemplo kiun faris Esperanto-klubanoj en Lorena/SP, Brazilo:

Vizito al la Baziliko...en proksima, konata urbo. Ĉiu promesis eviti krokodiladon. Unu el ili portis la Esperantan flagon. Ili vizitis la templon mem, la apudan muzeon, kaj la bazarcentron. La etoso estis gaja kaj kamardeca. Ili ĉeestis parton de meso, faris multajn fotojn, kaj bonguste lunĉis. Ĉio-ĉi eblis pro la jenaj antaŭ-preparoj:

1) Unu el ili antaŭe vizitis la retejon de la sanktejo kaj prezentis al la grupo la historion, la informojn pri arkitekturo, kaj kuriozajn faktojn pri tiu grava pilgrimejo.

2) Rilate lingvan lernadon, la grupo lernis plurajn aferojn:

a) distingo inter jenaj vortoj: kapelo, preĝejo, ĉefpreĝejo, katedralo, baziliko, sanktejo.

b) novaj vortoj rilate konstruaĵon: briko, tegolo, kupolo, turo, navo, altaro, kruco, greka kruco, bazarcentro;

c) novaj vortoj rilate religion: pastro, kardinalo, miraklo, fido, pia, hostio, sutano, surgenuiĝi, preĝi, krucumi, krucosigni.

## Leg-ideo+ - de Sylvain Lelarge

Elektu interesan artikolon [en Esperanto] kaj imagu ke vi ĝin laŭtleĝas al via malsana, preskaŭ blinda kaj sufiĉe surda avino; ŝi jes ja havas tute klaran menson kaj scivolemas pri ĉio... Ar-ti-ku-lu bone kaj elparolu bele (Kaj ĝenerale, provu ofte laŭtleĝi)

+El "Brazilei" n-ro 7, 2008

## How did you get Esperanto into a school?

Many years ago a questionnaire asking that question was sent to U.S. Esperantists:

A. What person or persons did you contact first?

B. What did you say to him/her/them?

C. What did you show them?

D. What follow-up did you do?

E. How long did it take from your first contact to receiving official permission to teach Esperanto? [From "Immediately" to "12 years"!] ]

F. What advice would you give to other Esperantists who want to follow in your footsteps?

Here is Kent Jones' summary of answers to that survey:

"Ĉefajo estas persona kontakto kun la estraranoj, lernejestroj, gepatroj, kaj instruistoj. La celo devas esti konsento ke Esperanto estos bona aldono al la kursaro, kaj ke almenaŭ 2 instruistoj en ĉiu lernejo lernu Esperanton--prefere ĉe SFSU [nun NASK].

"Tu en ĉiu Esperanto-grupo devas esti en konstanta kontakto--eble dum jaroj. Tiu persono ĉeestu kunvenojn, vizitu lernejojn, renkontu ĉiujn kiuj havas decidpovon; emfazu kiel Esperanto helpas ne nur lerni fremdajn lingvojn sed ankaŭ la anglan.

"Ankaŭ proklamoj de guberniestro kaj urbestro verŝajne efike impresas."

*A copy of the 3-page summary of answers to these questions is available from the editor upon request.*

## ILEI Matters

### ILEI-Konferenco en Benino

Bedaŭrinde neniuj Usonano povis ĉeesti la ILEI-Konferencon en Portonova, Benino, Afriko je pasinta julio/aŭgusto, kaj via redaktoro ĝis nun ne ricevis ian raporton pri tiu Konferenco, nek ekzempleron de Internacia Pedagogia Revuo pri ĝi.

### Juna Amiko

Ĉu vi konas la gazeteton *Juna Amiko*? Ĝi estas oficiala publikaĵo de ILEI kaj ja indas por instruistoj de Esperanto. Jen lastatempaj informoj pri ĝi:

Jen revuo kun tridektri-jara historio, kiu servas al junuloj kaj komencantoj. Ĝiaj ĉefaj celgrupoj estas:

- Infanoj, interalie el esperantaj familioj
- Lerneĵanoj, kursanoj kaj iliaj instruistoj
- Junuloj en grupoj kaj solaj
- Komencantoj kaj komencintoj de ajna aĝo

La revuo aperas trifoje jare, en aprilo, septembro kaj decembro, ĉiam kun 52 paĝoj. Ĝi estas abunde ilustrita, kun plenkoloraj kovriloj. Du redaktoroj kaj pluraj rubrik-redaktoroj pretigas ĝin. Akademiano kontrolas la lingvo-uzon. La enhavo kutime inkluzivas la jenajn temojn (inter aliaj):

**Interkulturo:** La klasoj kaj partoprenantoj de la

interkultura lernado regule prezentas sin kaj siajn kontaktojn en la revuo, por ke ili ja dividu ilin.

**La Kvin-kvizo:** Kvizo-folioj pretaj por kopiado al grupo. Legaĵo kun kvin divers-specaj kviz-ekzercoj. Por iuj--agrabla ludo, por aliaj--valora preparado por Esperanto-ekzameno.

**Gasto-rubrikoj:** Iuj prizorgataj de junuloj, kaj el plej diversaj mondpartoj. Ni jam havas prizorganton por nova rubriko Popol-kutimoj.

Junuloj pli kaj pli aliras legaĵojn, amuzaĵojn kaj informojn el la interreto. Pri tio *Juna Amiko* kunlaboras kun la hejmpaĝaro de la projekto Lernu.net, kie aperas tuta sekcio por legantoj de *Juna Amiko*:

- Mult-lingva ret-prezentado de la revuo.
- Artikoloj, iuj aperintaj, aliaj ne aperontaj en *Juna Amiko*.
- Ekzercoj, ludoj aŭ materialoj aldone al revuaj eroj.
- Ret-vortaroj, por helpi legantojn kompreni la tekstojn.
- Aliro al reta babilejo de lernu por mesaĝi al aliaj legantoj.
- Respondoj al enigmoj kaj konkursoj el la revuo.
- Freŝaj informoj, aktualaĵoj.

Iru al [www.lernu.net](http://www.lernu.net) kaj elektu: Biblioteko/gazeto/Juna amiko.

Ofteco rete, palpeblo revue.

Por Usonanoj, la kosto de jar-abono lastjare estis \$22.50. La peranto estas Esperanto-USA.

## From and About Our Members

**Forpasis Donald Houpe**, kiu estis membro de AAIE ek de marto 1995, kaj iĝis dumviva ano februare 2006. Dum la pasintaj tri jaroj, liaj Esperanto-lernantoj ekzameniĝis per nia Komencgrada Ekzameno, kaj pasintan febraron kelkaj per la Mezgrada; multaj sukcesis “kun honoro”.

Jen nekrologo pri Don de D. Gary Grady:

### Donald W Houpe PhD 29 nov 1940 - 20 aŭg 2008

Don Houpe, longtempa kaj aktiva esperantisto, lingvisto, kaj lingvoinstruisto, mortis la 20an de septembro en Chapel Hill, Norda Karolino, Usono, pro sekvoj de akcidenta falo en sia hejmo. Li estris la departamenton de fremdaj lingvoj de la Nordkarolina Lernejo pri Scienco kaj Matematiko, gimnazio en Durham, kie li instruis ekde ĝia fondo en 1980 kaj planis daŭre instrui. Postvivas liaj edzino, du filinoj, kaj aliaj familianoj.

Don esperantistiĝis antaŭ jardekoj kaj instruis Esperanton al centoj da studentoj, kelkaj el kiuj ankoraŭ aktivis. Krom Esperanto li instruis la hispanan, la francan, kaj la rusan, kaj fojfoje aliajn lingvojn kaj li daŭre lernis novajn. Pro lia ŝercemo kaj ĝentila maniero li estis tre amata de liaj studentoj kaj kolegoj. Dank’ al li, la gimnazio biblioteko havas unu el la plej grandaj kolektoj en sudorienta Usono de libroj, kompaktdiskoj, videofilmoj kaj aliaj aferoj en kaj pri Esperanto.

Li partoprenis en la loka, regiona, landa, kaj internacia movadoj, membris en Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, organizis regionajn kongresojn, kaj kelkfoje partoprenis en Norda Amerika Somera Kursaro. Lia mallonga komika videofilmo “D-ro Ratamanto” gajnis premion en internacia konkurso pri Esperanto-filmoj kaj nun spekteblas diversloke en la reto.

Post lia morto, kelkaj amikoj komentis, ke ili ne povas memori okazon, kiam li esprimis koleron. Dum la funebra ceremonio, en preĝejo plena je familianoj, kolegoj, kaj amikoj, unu parolanto diris, “Don Houpe estis homo de malmultaj vortoj, sed multaj lingvoj.”

*La hejmadreso de la familio estas 1002 Willow Drive #39, Chapel Hill NC 27514.*

Lastatempe raportisto de la ĵurnalo *Boston Herald* proponis verki artikolon pri Esperanto, kaj tiurilate kontaktis nian Korespondan Sekretariinon **Sally Lawton** (Northampton MA). Responde ŝi skribis jene:

“...I taught Esperanto as a volunteer for eleven years in a small local school. My aim was to introduce an experience with foreign language to 9-10 year olds (13-22 students). Each year I taught for 8 weeks two times a week. The teacher was very supportive until the pressure from the state mandates began. Soon after, she retired. The school situation has not improved for me.

“I have also a group of adults meeting weekly which has been going for about twenty years. We read together and

it is stimulating and fun but very low pressure. We attend area meetings and international Esperanto meetings in Europe, the Americas or China.... The largest international groups draw several thousand people and have many different program offerings as well as various excursions from the meeting sites.

“I visit Steve Brewer’s group at the University of MA, Amherst sometimes, but these people are not retired like my group so getting together is a bit irregular.

“But Esperanto belongs to the young, as does the learning of any foreign language. If children are not exposed they are not so able as adults...it is no secret that many Americans don’t feel called to speak anything but English, and that is from fear of the different...Children don’t have that fear...so that helps them learn. Exposure to a different system of pronunciation, spelling, new words is fun for children but can be a problem with adults, whose habits are stronger and hard to supplant.

“Esperanto has special virtues as a first foreign language. It is easier to learn and can be self taught by following the rules. ...The relative ease of Esperanto encourages the beginner, which is very important also for future learning of another language--whatever language that might be, in school or college or for travel or for work. Who knows what languages children will be needing in their later lives?...

“I was exposed to French--lightly, in kindergarten, 6th grade and high school and at home a little and have had an interest in other languages. So when I took up Esperanto at the age of 59 it was not so difficult. And I knew how to go about improving.”

Ĉe la ĉi-jara ĝenerala Asembleo de Unitaria-Universalismo en Fort Lauderdale, Florido, nia prezidanto **Ron Glossop** (Jennings MO) kun kvin aliaj Esperantistoj, ekspoziciis tuttage pri Esperanto de la 25-a ĝis la 30-a de Junio. Meze de la kvin-taga programo Ron parolis antaŭ 60 junuloj pri lingva malegaleco. Post la prelego, la junuloj volonte prenis dekojn da informiloj.

(El *Esperanto-USA* 2008/4)

Tre interesa artikolo de **Joel Brozovsky** (Spokane, WA) aperis en *Esperanto-USA* 2008/4 pri “Kial usonano uzas Esperanton?” Jen la ĉefaj kialoj:

Amikeco, Egaleco, Pord-malfermo, Helpi la mondon, Kreemo, Nova mondkoncepto.

La nomo de **Humphrey Tonkin** (West Hartford CT), antaŭa prezidento de UEA, aperas ofte en ties organo *Esperanto*. Ekzemple:

...Li verkis raporton pri la Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-ĵurnalistoj en Vilno, Litovio, pasintan majon (*Esperanto* Julio-aŭgusto 2008)

...Li estis unu el la prelegintoj ĉe la Lingvistka Instituto de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznan, Pollando (*Esperanto*, Julio-aŭgusto 2008)

...Li verkis artikolon pri la Belartaj Konkursoj de UEA 2008 (*Esperanto*, Sept. 2008)

...A. Giridhar Rao en artikolo titolita “Lingvoj: trezoro de la homaro”, skribis: “Enkondukante la kongresan temon en sia festparolado, Humphrey Tonkin parolis pri la avangardeco de Esperanto, analoge al la siatempa avangardeco de la urbo Roterdamo mem. Li emfazis la daŭre gravan rolon de Universala Esperanto-Asocio en la

progresigo kaj disvastigo de la lingvo. Tiucele, diris d-ro Tonkin, la centjara UEA en rapide tutmondiĝanta mondo devas adapti sin al la nova teknologia epoko--ĉefe al la eblecoj kaj defioj de la interreto--en tiu ĉi dua jarcento de sia ekzisto.”

(*Esperanto*, septembro 2008). Kaj la du-paĝa teksto de tiu festparolado aperis en la sama numero.

## Recommended Reading

### Pasporta Servo 2008

Listo de 1225 esperantistaj gastigantoj en 90 landoj.

### La Infanoj en la Arboj--Gudrun Pausewang

El la germana tradukis N. Caragea. 61 paĝoj. Ilustrita. Infanoj malhelpas la planon forbruligi arbaron.

### Internacia Ekzamenoj de ILEI/UEA

Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj de la Internaciaj

Ekzamenoj, kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaĵoj testoj. Taŭgas kaj por memstudado kaj por uzo en kursoj. 39 paĝoj.

### Juna Amiko

Kvaronjara gazeto por Infanoj (interalie el esperantaj familioj); lernejoj, kursanoj kaj iliaj instruistoj; junuloj en grupoj kaj solaj; kaj komencantoj kaj komencintoj de ajna aĝo. (Vidu sub “ILEI Matters”)

## Esperanto-Instruado Alilande

For the past ten years the Linguistic Institute of the Adam Mickiewicz University in Poznan, **Poland**, has cooperated with the International League of Esperantist Instructors in offering a graduate program in Interlinguistics. The latest group of participants consisted of 26 students from 13 countries, including **Poland, Germany, Japan, and Iran**. The third-year program emphasizes Esperanto teaching.

Seventy-eight people (including eleven 11-14-year-olds who had studied Esperanto in a Montessori school) enrolled in the Summer Esperanto Courses at the University of Tasmania in Hobart, **Australia**, in January 2007.

A five-day class in teaching correspondence courses was given in **Algeria** in June 2007. And in **Morocco** several

people have begun to learn Esperanto through internet courses.

In Liaoning Province, **China**, where 2007 was proclaimed “Year of Esperanto Instruction”, 500 students enrolled in Esperanto courses at Shenyang University. In September, 400 students at the same school chose Esperanto as an optional class.

In September 2007, a total of 334 students registered for Esperanto classes in three **Korean** universities, including Dankook and Wonkwang.

At the Foreign Language University in **Vietnam** 400 students participated in an Esperanto course in 2007.

## Want to Correspond

(el *Komencanto* marto-aprilo 2008)

21-jara studento, komencanto, kiu studas en la universitato de Antananarivo, en la scienca fakultato. Mi estas malagaso. Mi deziras korespondi kun japanaj, usonaj, malagasaj, aŭstraliaj kaj francaj gejunuloj. Mi ŝatas legi librojn, ludi gitaron, promeni kun miaj geamikoj, rigardi filmojn kaj aŭskulti muzikon. Andrimihaja Chrly, Lot IIA 119 RB Nanisana, MG 101 Antananarivo, **Madagascar**. <Dapouni@yahoo.fr>

61 jara viro, sufiĉe Esperanto-kapabla, lingvo-instruisto. Interesoj; naturo, kulturo, lingvoj. Mi tre ŝatas labori en mia kampo kaj vojaĝi al belaj pejzaĝoj. Mi volas korespondi retpoŝte kun komunikemaj homoj, kaj legi multe en Esperanto. Mi loĝas en Okcidenta Germanio. Claus Winterhoff, Dusseldorf, **Germanio** <verdastelo@t-online.de>

21 jara viro, komencanto, kiu studas psikologion ĉe la Universitato de Romo. Interesoj: politiko, psikologio, kulturo kaj religio. Mi korespondos paper-poŝte kaj retpoŝte. Valentino Coletta, via Perugia, 38, 04011 Aprilia LT, **Italia**. <valentino.coletta@fastwebnet.it>

19 jara junulino, komencantino, kiu studas por esti ĵurnalistino. Mi ŝatas novajn homojn, kiuj havas diversajn interesojn. Mi ŝatas esti en centro de eventoj. Sed de tempo al tempo mi volas silenton kaj solecon por pensadi kaj revii... Miaj ŝatokupoj estas teatro, muziko (klasika kaj rok'), ĉevalrajdo, legado de libroj. Mi ŝatas promenadon en la naturo kaj pasigi tempon kun miaj geamikoj. Mi preferas paper-poŝton, tio estas iom romantike, ĉu ne? Mi loĝas en Siberio, apud belega lago Bajkal, plej profunda lago sur la Tero! Julia Solovjova, 14, str. Medicinskaja, u. Ulan-Ude, Burjatio, RU-670047 **Rusio** <s\_g@inbox.ru>

## Kalendaro

### Oktobro 2008

10-12: **Nord-Okcidenta Tutlanda Oktobra Renkontiĝo**  
Regiona Esperanto-Konferenco - Outlook Inn,  
Eastsound WA. (Pli da informo de Haruo Ros' ĉe  
<rosharuo@gmail.com> aŭ Wally DuTemple  
<esperanto@shaw.ca>)

11-13: **15a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE)** -  
Silver Bay NY (Boris Legault  
<boris.legault@olf.mcgill.ca>)

### Januaro 2009

11-25: **24-a Aŭstralia Esperanto-Somer-kursaro** - Sidnejo  
"International House", internacia loĝejo de  
studentoj de la Universitato de Sidnejo en la  
urbocentro. (<aesk@esperanto.org.au>)

### Majo 2009

1-10: **21-a Esperanto-festivalo "Aroma Jalto"** en Ukrainio  
(<volodomir@ukr.net; <www..ulej.org.ua/aj>)  
22-25: **57-a Jarkunveno de Esperanto-USA** - St. Louis  
MO. Speciala gasto: Kuba gitaristo Julian

Hernandez Augulo. Kongresejo: Sheraton Westport  
Lakeside Chalet Hotel. (Ron Glossop  
<rglossop@mindspring.com>)

24: **Jarkunsido de AAIE** - Tagmeze - kadre de la  
jarkunveno de Esperanto- USA (vidu supre)

### Julio 2009

25-01 **Aŭg: 94-a Universala Kongreso** - Bjalistoko,  
Pollando ([http://uea.org/kongresoj/uk\\_2009.html](http://uea.org/kongresoj/uk_2009.html);  
<info@uea.org>)

**2010: 95-a Universala Kongreso** - En Havana, Kubo!

**2011: Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE8)** en  
Brazilio

*NOTO: Aktuala listo de konataj E-aranĝoj daŭre  
konsultebblas ĉe: [www.eventoj.hu/kalendar](http://www.eventoj.hu/kalendar)*

## Esperanto-Instruado per la Reto

En sia fest-parolado ĉe la U.K. en Roterdamo, **Humphrey Tonkin** diris:

"Ekzistas nenia dubo, ke la interreto plifortigas  
Esperanton produktante pli da novaj esperantistoj ol okazis  
dum jardekoj antaŭe..."

En decembro 2007 **lernu.net**, la plej granda ret-platformoj

por lernado de Esperanto, kaj unu el la plej ampleksaj kaj  
plej multlingvaj senpagaj-paĝaroj kiuj ekzistas en la  
Interreto por lernado de lingvoj, festis sian kvinjariĝon.  
Lastatempe la bone konatan dek-lecionan Esperanto-kurson  
(kiu estas havebla per lernu-net) oni tradukis en la Araban.

**Edukado.net** estas retejo por instruistoj kaj instruantoj.

## Pri Esperanto-Ekzamenoj

Congratulations to the following, who each passed one of  
AATE's official Esperanto examinations at the Esperanto  
convention in Montreal last July, both with distinction!

**Julie Spickler** (Menlo Park CA) - Intermediate  
("Mezgrada") test  
**Rick Miller** (Muskego WI) - Advanced ("Supera") test

### Frequently asked questions about Esperanto Tests

#### A. Why do people take Esperanto exams?

1. To satisfy themselves about their progress in the language.
2. To have something to show for all their efforts
3. To satisfy requirements for teaching Esperanto

#### B. What kinds of Esperanto tests are there?

1. For English speakers in the U.S. (Administered by Usona Ekzamena Servo\*)
  - a. Three levels: Basic (Komencgrada), Intermediaate (Duagrada), Advanced (Supera)
  - b. They can be administered anywhere any time by a teacher or an Esperantist. No knowledge of Esperanto is required for the administrator (the instructions are in English).
2. For Esperantists anywhere in the world, speaking any

language

- a. Two levels: "Baza" and "Mezgrada".
- b. Created by ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) and endorsed by UEA (Universala Esperanto-Asocio)
- c. Completely in Esperanto. Both require ability to speak and understand Esperanto. A pre-test is necessary before qualifying for either test.
- d. Can be administered only by trained Esperantists at any Esperanto event by pre-arrangement.

#### C. How much does it cost?

1. Each U.S. exam: \$10
2. Each ILEI-UEA exam: 60% of the cost of MA membership in UEA.

#### D. What do I have to know in order to pass?

1. For U.S. exams, a list ("syllabus") of the grammar included in each level is available from UES\*.
2. For ILEI-UEA exams: Consult the booklet "Internaciaj ekzamenoj de ilei/uea", available from Esperanto-USA.

#### E. Do I get a grade?

1. No. Only "passing" "With distinction" or "did not pass".

2. In order to pass a USA test, more than 50% of the answers must be correct.
3. To get "With distinction", at least 93% of the answers must be correct.

F. *Do I get a diploma if I pass?*

1. Yes.
2. The U.S. certificates contain your name in beautiful calligraphy; the date; and the signatures of the UES administrator and the AATE and Esperanto-USA presidents.

G. *Can I take a U.S. test again if I don't pass it the first time?*

1. Yes—after further study, of course!

\*Usona Ekzamena Servo

(U.S. Esperanto Test Service)

5140 San Lorenzo Drive, Santa Barbara CA 93111-2521;  
<dorothyh77@gmail.com>

*Under the auspices of*

American Association of Teachers of Esperanto and Esperanto-USA

## Children and Esperanto

El Raporto de Ron Glossop 4 julio 2008

Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo estis fondita de Charlotte Kohrs...en Majo 1987 en San Diego, Kalifornio. Charlotte ne nur instruis Esperanton al infanoj...sed ankaŭ produktis kelkajn videbendojn, elsendis duonjarajn bultenojn por infanoj, komponis kantojn por instrui Esperanton al infanoj, kaj verkis libretojn, kiuj povas servi kiel lernolibroj por infanoj. Oni povas akiri tiujn materialojn perpoŝte de ELNA, UEA, aŭ mi kaj perrete ĉe <www.icllm.org>.

En...2001 mi konsentis iĝi la Direktoro de Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, kaj en...2003, post la morto de Charlotte, mi transportis al mia domo en Sankto-Luiso ĉiujn materialojn, kiun Charlotte amasigis en San Diego...Antaŭ

kvar jaroj mi sendis ekzemplerojn de ĉiuj tiuj libretoj al Katalin Kovats en Nederlando, por ke ŝi povu priskribi ilin en <www.edukado.net>, la retejo por instruistoj internacie....

Mi komunikas kun kelkaj instruistoj de Esperanto en aliaj landoj, aparte tiuj kies lernantoj ne povas uzi komputilon. Mi sendas senpage instru-materialojn, inkluzive de papero kaj skribiloj...dum la pasinta jaro...al Dem. Rep. of Congo...kaj..Benin.'

En 2005 Enriko Ellemborg konsentis mastrumi kaj plibonigi nian ret-paĝon <www.icxlm.org>...Enriko ankaŭ verkis mallongan artikolon pri la ret-paĝo de ICLM kiu aperis in *Internacia Pedagogia Revuo*, 08/1, paĝoj 30-31...

## Esperanto-Instruado en Usono kaj Kanado

On July 7, 2008, **Don Houpe** sent the following report on his Esperanto classes at the North Carolina School of Science and Mathematics in Durham, NC. Although he passed away unexpectedly the following month (see page 4), his accomplishments are worth noting as an inspiration to all who teach, or aspire to teach, Esperanto to young people; and his report is an admirable model for every teacher to follow when reporting an Esperanto class to our Education Secretary, and contains excellent teaching suggestions as well.

*Location:* The North Carolina School of Science and Mathematics, Durham NC

*Level:*

Elementary...(November 2007 - February 2008 (2nd trimester)

Intermediate...(March - end of May 2008) 3rd trimester

*Number of lessons:* Each class met four days a week for 10 weeks

*Duration:* Each lesson lasted 50 minutes.

*Materials used:*

Elementary... *Jen Nia Mondo I, Jen Nia Mondo II* (Lessons 13-14);

*Ana Pana* (lernu.net), selected stories from *La Kisa Malsano*, Piron and Bako, "Artamaj Astronomoj" with audio, from <edukado.net>; E-muziko.

Intermediate...: *Jen Nia Mondo II*, Lessons 15-24; *Pasporto al la Tuta Mondo* Lessons 1-12, *Vere aŭ Fantazie* (Piron), Chapters 1-5; selections from *La Ŝtona Urbo* by Anna Lowenstein; individual book reports - Each student selected a book in Esperanto

from the Library and wrote a one-page report in Esperanto. Each student presented his/her report orally to the class, writing new vocabulary on the board. At the end of a report the presenter asked 4-5 questions in Esperanto of the class. Members of the class were also encouraged to ask questions in Esperanto of the presenter.

NOTE: THE NCSSM Library has over 820 titles in and about Esperanto.

*Number finishing course:*

Elementary...6

Intermediate...4

*Age range:* 16-18

*Previous language skills:* Each student had completed at least two years of another language, Spanish, French or Latin.

*Course shown in student records?* Yes, each student received a letter grade which appears on the student's official transcript.

*AATE Exam:*

Elementary: Komencgrada Ekzameno - 4 of 6 passed, 2 "Kun Honoro"

NOTE: The two who failed [this exam] received a low passing grade for the course because of their overall work during the trimester.

Intermediate...: Duagrada Ekzameno - 4 of 4 passed, 2 "Kun honoro".

La jena raporto de Kim Keeble aperis en la maja 2008 numero de *Inter Ni*, ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Nov-Skotio, Kanado:

“Dum preskaŭ tri jaroj, mi ne instruis Esperanton en lernejo, sed nuntempe mi gvidas Esperantan Klubon en Cavalier Drive School... Tiu sufiĉe granda lernejo situas en Lower Sackville, antaŭurbo de Halifaxo, la ĉefurbo de Nov-Skotio, en orienta Kanado.

“Unue...pri la naskiĝo de tiu Klubo. Antaŭ du jaroj, Johano Green aniĝis de nia eta Rondo. Li estas memlerninta komencanto kiu kredas ke Esperanto esta bona lingvo kaj ege taŭgas por internacia interkompreno kaj komunikado. Li logas en Lower Sackville, kune kun sia edzino kaj tri gefiloj. Nia rondo estis lia unua renkonto kun esperantistoj. Unufoje li demandis al mi, ĉu mi volus instrui Esperanton al infanoj en lernejo. Mi jesis... Tamen mi avertis lin, ke ne estas facile interesigi la edukajn instancojn pri Esperanto.

“Dum frua oktobro pasintjare, hazarde tri amikinoj el Japanio vizitis nin - mia plumamikino, kune kun sia filino kaj [ties] amikino... [kiuj] estis muzikistoj kaj distris nian rondon per koncerteto ĉe posttagmeza kunveno [kiun] Johano ne povis ĉeesti. Do, mi sugestis ke li kaj la gefiloj vizitu nin poste. Li jesis... La geinfanoj tre plaĉis al niaj japanaj vizitantoj kaj reciproke....

“Poste Johano parolis kelkfoje kun... la lernejestro de Kavalirvoja Lernejo (kie studas la tri gefiloj de Johano), pri la valoro de Esperanto kiel pontlingvo en la lernado de fremdaj lingvoj... [Poste] mi klarigis al [la lernejestro] ke mi dezirus fari prezentadon pri Esperanto al la junaj lernantoj el la 3-a ĝis la 6-a klasoj... kaj iliaj instruistoj, kun la celo iniciati Esperanto-Klubon. Li konsentis...

“Do, la venontan vendredon, la klubo kunvenis en la

leneja biblioteko, kaj Johano, la lernejestro kaj kelkaj geinstruistoj rigardis kiam mi instruis Esperantan lecionon. Kvardek lernantoj aliĝis la Klubon sed... ne ĉiuj ĉeestis tiun kunvenon. Ek de tiam, ni kunvenis ĉiun vendredon dum la lunĉohoro, kaj tio signifas, ke mi instruas dum malpli ol 45 minutoj ĉiun kunvenon. Mi utiligas la kurson “Dek Demandoj” kiel lernilon. Mi ankaŭ montris unufoje la unuan lecionon de ‘Mazi’ al la klubanoj. Ili ĝuis la videon, eĉ se ili ne povis bone kompreni la paroladon. Nun, restas nur 17 klubanoj, sed ili vere volas lerni kaj uzi Esperanton. Ili bone kantas Esperantajn kantojn, ludas ‘Dek’, skribas kaj, kompreneble, parolas Esperanton en la nova klubo.

“Katalin Kovats sugestis al mi, ke ŝi faru anoncon pri la nova klubo en la retpaĝo de <edukado.net>. Pro tio, ĝis la fino de aprilo, ni ricevis 22 belajn poŝtkartojn el Finnlando, Svedio, Britio, Germanio, Nederlando, Aŭstrio, Francio, Hispanio, Ĉeĥio, Norvegio, Brazilo, Japanio, Portugalio, Meksiko, kaj Kanado. Ni sendis dankkartojn al tiuj, kiuj skribis siajn adresojn sur la kartoj, kaj la ricevatajn kartojn ni metis en belan liberfolian kajeron tiel ke oni povas vidi la du flankojn de ĉiu karto kaj anglan tradukadon de la skribita esperantlingva mesaĝo. La Klubo ricevis [de Steĉjo Norvell] donacon de 35 ekzempleroj de la mirinda bildvortaro por komencantoj ‘Poŝamiko’....”

Charlie Galvin and Drea Monticue are teaching Esperanto to two students twice a month at the San Francisco Buddhist Temple.

For more than twenty years, Sally Lawton (Northampton MA) and Dorothy Holland (Santa Barbara CA) have both led a local group which is still meeting once a week and reading Esperanto together.

## Anoncoj

### Financial Support for Projects

The Schulze Education Fund aims to provide financial assistance to educational projects which further the use of Esperanto, primarily in North America. Past recipients include providing money to a student group at MIT to help buy the first four lessons of the videotape “Esperanto: Pasporto al la Tuta Mondo”; and money to support Esperanto courses taught at the Southeast Conference in Atlanta. During the past two years no requests were received. Awards are made only to members of ELNA [now Esperanto-USA] and cannot be used for salaries or scholarships. The present balance in this fund is approximately \$25,000.

Persons having an educational project for which they would like to receive some financial assistance should send a request to Dr. Ronald J. Glossop, the chair of the Catherine L. & William H. Schulze Education Fund Committee, 8894 Berkay Avenue, Jennings MO 63136-5004, preferably by the 30th of April.

The letter requesting assistance must include:

- 1) the plans for the project;
- 2) the aim of the project;
- 3) the duration of the project
- 4) a budget for the project
- 5) the names of the person(s) who will carry out the work; and
- 6) an indication of how many persons will benefit from the project

Because at the moment we do not yet have a new Education Secretary, please send your course report to the editor, Dorothy Holland (see address below).

The deadline for receiving your contributions to the January 2009 issue of the *AATE Bulletin* is January 15. Aparte dezirataj estas raporto pri via Esperanto-klaso, kaj viaj sugestoj kiel trovi Esperanto-lernantojn, kaj kiel plej efike instrui Esperanton.

Sendu ilin al Doroteo Holland, Redaktoro, 5140 San Lorenzo Drive, Santa Barbara CA 93111-2521 aŭ rete al ŝi ĉe <[dorothyjeanh@gmail.com](mailto:dorothyjeanh@gmail.com)>



# American Association of Teachers of Esperanto

## COURSE REPORT FORM

### INSTRUCTOR

Name Address \_\_\_\_\_

Email address \_\_\_\_\_

### COURSE

Location \_\_\_\_\_

Tuition cost \_\_\_\_\_

Level: Elementary \_\_\_\_\_ Intermediate \_\_\_\_\_ Other \_\_\_\_\_

Beginning and ending dates \_\_\_\_\_

Number of lessons \_\_\_\_\_ Duration of each lesson \_\_\_\_\_

Material used: Books \_\_\_\_\_

Videos \_\_\_\_\_

Other \_\_\_\_\_

### STUDENTS

Number finishing course \_\_\_\_\_ Age range \_\_\_\_\_

Previous language skills \_\_\_\_\_

Is the course shown in the student records? \_\_\_\_\_

Was an AATE exam administered? \_\_\_\_\_

### FORMATION OF CLASS

Name of organizer \_\_\_\_\_

Publicity method used \_\_\_\_\_

Supplier of course materials \_\_\_\_\_

### COMMENTS OF INSTRUCTOR

Concerning publicity

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

Concerning materials

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

Concerning teaching

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

*Please return this form to:*

Dorothy Holland  
5140 San Lorenzo Drive  
Santa Barbara CA 93111-2521

E-mail: <dorothyjeanh@gmail.com>

# American Association of Teachers of Esperanto

## MEMBERSHIP FORM

Voting members consist of professional educators (either active or retired) who are interested in Esperanto, and non-professionals who teach, have taught, or intend to teach Esperanto.

NAME \_\_\_\_\_ PHONE (\_\_\_\_) \_\_\_\_\_

ADDRESS \_\_\_\_\_

CITY, STATE \_\_\_\_\_ ZIP \_\_\_\_\_

E-MAIL ADDRESS \_\_\_\_\_

I do not want the following information to appear in the AATE membership list:

\_\_\_ My telephone number \_\_\_ My e-mail address \_\_\_ Other \_\_\_\_\_

NAME & ADDRESS OF SCHOOL \_\_\_\_\_

Are you a professional educator? \_\_\_ Yes, active \_\_\_ Yes, retired \_\_\_ No

Annual dues are \$40. Memberships are for the calendar year. If you join in the middle of the year, you will receive "Bulletins" previously distributed during that year. All AATE members are automatically members of the International League of Teachers of Esperanto (Internacia Ligo de Instruistoj de Esperanto) and receive their quarterly *Internacia Pedagogia Revuo*.

If you wish to receive AATE's Bulletin and ILEI's *Internacia Pedagogia Revuo* electronically, instead of via regular mail, the annual dues are \$20. Please indicate here: \_\_\_\_\_

Life Membership \$800 \_\_\_\_\_ with subscriptions by mail      \$400 \_\_\_\_\_ with electronic subscriptions

What year is this membership for? 20\_\_\_\_      \_\_\_ New \_\_\_ Renewal Today's date: \_\_\_\_\_

I wish to give \$ \_\_\_\_\_ as a donation to AATE.

Make your check payable to "American Association of Teachers of Esperanto" or "AATE" and mail it with this form to Sally Lawton, 12 Stage Road, Westhampton, MA 01027